

N°199  
juillet  
août  
septembre  
2022

# LA INFORMILO

N° 199  
julio  
aŭgusto  
septembro  
2022

l'espéranto  
la langue de l'amitié  
sans frontières

esperanto  
France-Est

ESPERANTO  
2022  
Justa komunikado

esperanto  
★ estas ★  
mojosa!

ESPERANTO

FRANCE-EST

association culturelle  
pour la promotion  
de la langue  
internationale

ESPERANTO

regroupant  
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes  
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 18 €

Reta abono: 7,50 €

## Enfin un congrès mondial en présentiel!

Du 6 au 13 août 2022, Montréal a enfin pu accueillir le 107<sup>ème</sup> congrès mondial d'espéranto de l'Association universelle d'espéranto UEA après deux congrès virtuels dus à la pandémie.

Certes, de nombreux Chinois, Cubains et Africains n'ont pas pu venir faute de délivrance de visa, mais les 60 bénévoles de l'équipe d'organisation, réunis autour du président du comité d'organisation, Normand Fleury, ont réussi à donner satisfaction aux centaines de congressistes.

Le président avait appris l'espéranto à Angers en 1980. Il s'est marié avec une espérantophone croate. Ils vivent au Québec et, comme dans de nombreux couples espérantophones de nationalité diverse, leurs enfants baignent dans l'espéranto dès leur naissance et parlent aussi les langues maternelles de leurs parents.

Un fait réjouissant: une forte proportion de participants avaient moins de 40 ans et assistaient à leur premier Universala Kongreso. La plupart avait étudié l'espéranto en ligne grâce aux cours gratuits:

<https://ikurso.esperanto-france.org/> lernu.net ou duolingo

Informez vos amis! Le monde s'ouvrira à eux grâce à l'espéranto.



## Amika tago en Sélestat la 2an de julio 2022

Edmond Ludwig je la nomo de la grupo de Mulhouse proponis organizi la "Amikan Tagon" de 2022 en Sélestat. Nia rendevuo estis en la stacidomo de Sélestat je la 10a15.

Tamen jam antaŭ la 10a matene alvenis samideanoj per aŭtomobiloj. Jen la unuaj salutoj post monatoj da foresto de konkretaj renkontiĝoj. Edmond klarigis kiujn trajn-veturantojn ni ankoraŭ atendu.

Kiam ĉiuj estis alvenintaj, Edmond proponis, ke ni ĉiuj forlasu tiun provizoran parkejon por atingi iom pli fore pli vastan kaj senpagan parkejon. Ŝajne iuj planis eĉ rekte atingi ĝin. Efektive el Frajburgo venis 3 samideanoj per granda ruldomo. Venis homoj el Saint-Louis, Nancy, Mulhouse, Barcelono kaj eĉ Strasburgo. Jen la grupo estis tute komplementa.

La promenado tra la urbo povis komenciĝi sekvante Edmond kaj iujn spurojn sur la trotuaroj aŭ stratoj.



Jen la tribunalo realigita dum la germana periodo en 1900. La skulptaĵoj de la fasado rilatas al la temo pri justeco. La strigo simboligas la inteligentecon



Jen survoje aperis tiu ĉarma fasado



Konstruita ekde 1280 fare de la franciskanoj, detruita en la 19a jarcento ĝi iĝis protestanta preĝejo en 1881.



**La Humanista Biblioteko** montras librojn (elektronike legeblajn) kaj biografiojn de scienculoj de la 15a kaj 16a jc., inter ili Erasmus de Rotterdam, Montaigne, Melanchthon, Luther kaj Beatus Rhenanus de Sélestat, kiu kolektis tiujn librojn:  
[www.bibliotheque-humaniste.fr](http://www.bibliotheque-humaniste.fr)



**La Humanista Biblioteko**



Nia grupo daŭrigis sian promenadon, survoje ni povis admiri la urbodomon kaj la armilejon, konstruitan ĉirkaŭ 1470. En la 19a jarcento ĝi iĝis ekspoziciejo kaj fest-salono. Baldaŭ ni atingis la kvartalon Vauban.

Proksime de preĝejo ni trovis taŭgan lokon kun benkoj por la piknikado. Tiam aldoniĝis al la grupo Michel Basso. Poste Edmond daŭrigis la ĉiĉeronadon tra la urbo, kies historio aperis en ĝia plena riĉeco. La vizito al la du muzeoj, Domo de la pano kaj la humanista biblioteko estis ege valora.

Ĉe trinkejo la ĉeestantoj vigle diskutis pri nia federacio, pri la Strasburga kongreso en 2024. Ni dankis al Edmond pro tiu agrabla sukcesa tago.

## Renkontiĝo en TROYES (Aube)

De pli ol tridek jaroj nodiĝis rilatoj inter esperantistoj de ĝemeligitaj urboj kun Troyes (Aube), ĉefe Darmstadt kaj Alkmaar. Bedaŭrinde de du jaroj renkontiĝoj ne povis esti organizataj pro la pandemio de la kovim-19.

Okaze de la pentokosta semajnfino kvar germanaj amikoj el Darmstadt vizitis la grupon Esperanto 10 en Troyes. Ili ĝuegis reviziti nian belan

urbon, kies centro estas iomete ŝanĝita notinde laŭ la kanalo pere de novaj skulptaĵoj. Suzanne kunportis du foto-albumojn pri niaj antaŭaj renkontiĝoj en la tri urboj. Ĉiuj rigardis, komentis, babilis pri malnovaj memoraĵoj.. Ĉiu alportis ion por manĝi, trinki kaj ni gustumis germanajn diversajn cidrojn kaj pomsukojn.

Fine de dimanĉo per skajpo ni salutis Norvegojn kaj Italon, Luigi, kun kiu ni interkonatiĝis okaze de renkontiĝo en Darmstadt. Poste Brescia estis ĝemeligita kun Troyes. Luigi invitis nin partopreni la italan kongreson fine de aŭgusto 2022 en Brescia.

Ĉiu estis tre kontenta revidi unu la alian kaj ni ĉiuj kune trapasis agrablegan momenton.

Esperanto10



## 56-aj Baltiaj Esperanto Tagoj 2022 en Klaipėda Litovio de la 9-a ĝis la 17-a julio 2022 raportas Manfred Westermayer

En la jaro 1959 Biruta Rozenfelde invitis esperantistojn el la baltiaj landoj Estonio, Litovio kaj Latvio al Baltia Esperanto Tendaro por renkontiĝi, ĉar landaj asocioj dum tiu tempo en Sovetunio ne estis permesitaj; ŝi ankaŭ partoprenis la 56an BET-on. Kvarfoje oni malpermesis BET-on. Poste ĝi iĝis tut-sovetia kunveno de SEJM (sovetia esperanto junulara movado) ĝis la disfalo de Sovetunio.

Ni alvojaĝis triope per giganta pram-ŝipo rekte de Kiel ĝis Klaipėda; envojaĝante en la grandan havenon, 2 modernaj altaj konstruaĵoj okulfrapis nin, kiuj dum la preterveturado kun-gelis.

Klaipėda havas ĉirkaŭ 200, Kaunas 400 kaj la ĉefurbo Vilnius 600 mil da enloĝantoj.

250 homoj aliĝis al BET-56: el 19 landoj inter Koreio, Pakistano, Serbio, pluraj EU-landoj, Islando kaj Usono; bedaŭrinde preskaŭ 20 el Rusio kaj Belorusio ne povis veni; eĉ ne el la proksima urbo kaj rusia provinco Kaliningrado (germane Königsberg).

La kongreso estis dediĉita al la 770-jariĝo de Klaipėda kaj 135-jariĝo de Esperanto. La kongresa libro sur 146 paĝoj montras, krom la organizajn informojn, multajn historiajn kaj geografiajn raportojn pri Litovio kaj pri unuopaj BET-oj, la litovan lingvon, 13 litovajn esperanto-poetojn, vidindaĵojn de la urbo kaj informojn pri la prelegoj.

La solena malfermo okazis en la koncerta salono de la urbo. Pli ol 16 prelegoj (parte seriaj), 5 SUS-prelegoj de AIS (Somera Universitato – organizite de Amri Wandel) kaj pli ol 10 kulturaj aranĝoj okazis en diversaj konstruaĵoj de la Universitato de Klaipėda. Tute proksime ni hazarde vidis kaj vizitis grandan tombejon por germanaj soldatoj el la du mondmilitoj, flegatan de germana asocio por soldato-tombejoj.



Du ekskursoj okazis duontage – piede konatiĝi kun la urbo Klaipėda, kaj Japana Ĝardeno:

La centro de la urbo kuŝas sude de rivereto Dane. Je la alia flanko estas parko, kiu laŭlonge de la vojo montras la ĉefajn datojn de Litovio laŭlonge de pluraj reloj – tre interesa ideo montri la historion. La vojoj en la malnova urbocentro estas originale pavimitaj, domoj plejparte originale restaŭritaj. Meze de la Teatra Placo staras monumento de “Ännchen von Tharau”, ĉar Simon Dach la verkisto de tiu poemo naskiĝis en Memel. La Historia Muzeo pri la urba kulturo kaj historio montras plurajn originalajn mapojn, meblojn, folklorajn vestaĵojn, ktp. En la proksima regiono Ŝilutė troviĝas kelkaj protestantaj preĝejoj, sed Litovio plejparte estas katolika. Tio estas sekvo de la subteno de la pola reĝo je la bataloj (ĝis 1410 – Tannenberg / Grundwald) kontraŭ la Germana Ordeno. En Litovio ankaŭ ekzistas oficiala nov-pagana religio Romuva.

Litova etno en tiu regiono ekloĝis jam 3000 a.K. La unuafoja dokumento pri litova ŝtato estis 1009 en la Jarlibroj de Quedlinburg, kaj poste 1253 kiam la Papo kronigis reĝon Mindaugas. Ek de tiu tempo Litovio estis ligita kun germanoj (i.a. Germana Ordeno), poloj (komuna regado) kaj rusoj (1795 – 1918, kaj 1944-1990); sed ĉiam restis la etna popolo de litovoj, kiuj sukcesis konservi sian lingvon kaj parte ankaŭ natur-religian kulturon, simile al la etnoj en Latvio kaj Estonio. Ili lernis el sia historio, ke necesas komunuma spirito por la patrio, ĉar la grandaj najbaroj ĉiam pretus regi super ili. La ĉeno de kantantaj homoj je 600 km trans tiuj 3 ŝtatoj “La Baltia Vojo” en Aŭgusto 1989 estis la videbla komenco de nuna sendependeco de la 3 baltiaj ŝtatoj. Litovio je la 11a de Marto 1990 kiel unua sovetia lando deklaris sian sendependiĝon.

Mi partoprenis tuttagan ekskurson en la regiono Ŝilutė en tiel nomata Malgranda Litovio – kiu estis la plej nordorienta parto de Germanio ĝis 1919-laŭlonge de la laguno ĝis Memel, inkluzive de la delto de Nemunas. Tiu estas granda natur-protekta regiono, bone ekipita per lignaj padoj super la marĉoj por eko-turismo. Ni vizitis la kabon Ventė-vere ventumita loko, je fino de malgranda duoninsulo, kie staras lumturo, kaj tie vizitis instituton por protekti migrantajn birdojn, ĉar tie estas bona loko por kapti ilin, mezuri kaj ringumi ilin – kaj poste ili rajtas daŭrigi. La unua birdo-

stacio ek de 1901 troviĝas en Rositten (nun Rybaĉi, Kaliningrada oblast), je la bordo de la Balta Maro. Poste ni veturis per boato sur la delto. La alia ekskurso estis al la Kurŝa Terlango (Kuronio Duoninsulo) pri kiu Halina Gorecka (Kaliningrado) en la kongreslibro prezentis tre detalan eseon – kaj jen la raporto de Hilde Stecay:

Per buso ni veturis sur pramo 500m de Klaipėda al vilaĝo Smiltynė je la orienta fino de la terlango. Jam Alexander von Humboldt en printempo 1829 vizitis ĝin. De Smiltynė ni veturis al la vilaĝo Juodkrantė (Schwarzort), kie ni promenis tra arbaro sur la *Raganų kalnas*, t.e. “Monto de Sorĉistinoj” ĝis la pinto de tiu monteto. En 1979 laŭlonge de la pado estis starigitaj lignaj skulptaĵoj, ekzemple sorĉistoj kaj sorĉistinoj, diabloj, drakoj kaj aliaj figuroj el la litova mitologio. Post komuna tagmanĝo ni grimpis ĝis 67

metroj al la pinto de la duno. De tie oni povas rigardi ĝis la rusia tereno.

La terlango konsistas el gigantaj sablaj dunoj, kiuj migradis dum la pasintaj jarcentoj kovrante plurajn vilaĝojn. Nur fine de la 19a jarcento per plantado de pinarboj oni sukcesis stabiligi la dunojn. Intertempe pinoj kovras grandan parton de la terlango. Por protekti la dunojn estas instalitaj lignaj padoj por turistoj, kiuj tiel povas surgrimpi la dunojn kaj rigardi aŭ la maron aŭ la lagunon aŭ la arbaron.

Nia lasta celo estis la urbeto Nida. Ekde 1880 kuraĉloko, kie artistoj, verkistoj kaj nobeluloj i.a. el Königsberg ŝatis pasigi siajn feriajn tagojn. Nida havas ĉirkaŭ 1500 enloĝantojn kaj estas multe vizitata de turistoj i.a. pro la domo de Thomas Mann, kiu feris tie dum tri someroj. Nun la domo estas muzeo kaj loko, kie okazas eventoj honore al li.

Dum nia revojaĝo al Klaipėda ni paŭzis ankoraŭ-foje apud Juodkrantė kaj vizitis koloniojn de kormoranoj kaj grizaj ardeoj, kiuj estas ŝatataj de turistoj, sed ne de fiŝkaptistoj, kiuj estas malkontentaj pro tia amaso da birdoj, kiuj kaptas fiŝojn kaj malpurigas la pejzaĝon.

Skribas Hildegard Stecay

**Manfred transdonas la salutojn de Raita PYHALA, la finna amikino de Ginette, al geamikoj en Alzaco kaj Loreno.**

*Mi veturis per trajno de Frankfurt al Kiel, kaj de tie per pramo al Klaipėda, kie BET okazis. Ni estis tri samideanoj sur la pramo, kaj tia vojaĝo estis ege agrabla. Sur la ŝipo ni bone interparolis kun geedzoj el Svislando, kiuj ankaŭ veturis al Litovio, ĉar ilia filo tie edziĝis al litova knabino.*

*BET okazis de la 9-a ĝis la 17-a julio 2022. Al ĝi aliĝis 263 esperantistoj el 30 landoj. La programeroj de la evento estis bonaj. Ĉeestis eĉ Duncan Charters tie, kiu proponis seminarion "Instruado kaj lingvo-lernado", kaj parolis pri la temo "Kiel paroli publike pri Esperanto kaj kiel respondi al kritikoj pri Esperanto". Mi ĝojis renkonti denove Dalia Pileckiene kaj Grazina Opulskiene. Dalia mi renkontis en Les Issambres, kie ŝi ofertis tre bonan kurson, kaj Grazina mi konas jam ekde multaj jaroj, ĉar ŝi jam dum IFO ĉeestis. Certe ankaŭ vi memoras pri ŝi, ĉu ne? Ankaŭ Amri Wandel ĉeestis kaj ofertis la prelegon pri "Hubble ĝis James Webb". Kiel ĉiam dum Esperanto-eventoj ni devis decidi inter kelkaj prelegoj kaj ekskursoj. Ilona Koutny ofertis preleg-serion pri esperantologio.*

*Vespere ĉiam okazis koncertoj, i.a. de Anjo Amika, Sepa kaj Asorti, Saša Pilipovic kun kaj sen Georgo Handzlik aktorin kaj kantis. Mikaelo Bronštejn estas unu de tiuj kiuj aliĝis, sed ne povis veni. Tamen okazis zoom-koncerto kun li!*

*Klaipėda estas bela urbo. Ni promenis tra la urbo kaj vizitis i.a. iaman subteran fortikaĵon, kiu prezentas la historion de Klaipėda ekde la mezo de la 13a ĝis la 17a jarcentoj. Ege interese. Tra la urbo fluas la rivero Dane, kaj ek de kelkaj jardekoj en centra loko de la urbo sur la rivero ĉiam videblas la granda velŝipo "Meridianas", ĝi estas kvazaŭ simbolo de la urbo Klaipėda. Mi partoprenis tuttagan ekskurson al la "Kurŝa terlango", kiu estas duoninsulo, longa je 98 km kaj mallarĝa inter ĉirkaŭ 0,50 kaj 3,8 km. Preskaŭ en la mezo estas limo inter Litovio kaj Rusio. Ni promenadis ĝis la limo, kie oni povas rigardi ĝis la rusia parto (Kaliningrad).*



## **Kaunas - Gdansk - Bierun - Vroclavo - Julio 2022**


*Raportas Manfred*

De Klaipėda ni veturis (Hildegard kaj mi) per buso al Kaunas (Sabato posttagmeze, 16a de Julio). Nia loĝejo estis proksime al la malnova kastelo-ruino (burgo), kie alfluas Neris en la Nemunas-riveron. La loĝejo troviĝis iom super la urbo, do, ni havis belan rigardon al ambaŭ riveroj kaj la pejzaĝo.

Dimanĉe ni promenis laŭlonge de la rivero ĝis la burgo kaj la kunfluejo. De tie trans la malnova urbo. Meze en la granda foiro-placo troviĝas la urbodomo kun alta turo (tiam en restaurado). Ni ankaŭ vizitis la preĝejon de Jezuitoj, kaj vidis la tre malnovan gimnazion de Jezuitoj (de 1570) - mi ĵus legis, ke ili havas partnerecon kun la jezuita gimnazio en St. Blasien (Nigra Arbaro / Germanio).



Nano antaŭ Heliopolis,



**Varsovia Okcidenta, matene**

Ni daŭrigis ĝis la Zamenhofa gativé No. 5 - la domo kie loĝis la bogepatroj (bopatrino Klara Zilbernik) de Ludwig L. Zamenhof. Ĝi iam apartenis al LEA; bedaŭrinde ĝi bezonas grandan renovigon, sed nuntempe la respondeco estas ne klara.

Poste ni vizitis la muzeon pri Mikolajus K. Čiurlionis - granda komponisto kaj ankaŭ pentristo fine de la 19a jarcento (li mortis en 1911). Estas tre granda salono pri liaj pentraĵoj kaj alia, kie aŭdeblas lia muziko. Tiam tie estis ankaŭ ekspozicio pri William Kentridge. De tie ni reiris super la monteton al nia loĝejo. Vespere ni trapasis la longan

ponton trans Neris - la vojeto por piedirantoj kaj biciklistoj estis tro mallarĝa.

Lunde ni supreniris la monton ali-flanke de Nemunas - per telfero, por ĝui la belan rigardon super la urbo. Poste ni renkontiĝis kun Asta, kiu veturigis nin kune kun (?) al la regiono laŭ la fluo de Nemunas. Estas tre verda pejzaĝo. Ni supreniris monteton, vizitis sanktejon de paganoj (nun Romuva-religio/movado en Litovio). Ni tagmanĝis en gastejo, kie manĝaĵoj kaj ankaŭ la vestaĵoj de la servistoj estas historiaj. Kaj posttagmeze vizitis la kastelon Raudondvario Dvaras, kiu troviĝas super alfluejo de Nemunas, Nevežio - (En 2019 mi partoprenis BET en Panevežis). Ĉar estis Lundo, ni ne povis viziti la artaĵojn tie - iam tie oni ankaŭ bredis ĉevalojn.

Marde, denove Asta helpis nin kaj ni veturis al la IXa Fortikaĵo (Devintas Fortas, de 19a jc.) je la rando de la urbo. Survoje - je alia flanko de Neris ni haltis en la urboparto Vilijampole, kie troviĝis la ghetto Slobodka.



**Kaunas - IX Fort - Murpentraĵo**

La IXa Fortikaĵo estas granda muzeo pri la militoj, okupacioj kaj historio, ĉefe de la 20a jarcento - poste estis koncentrejo, KZ Kauen. La tempo ne sufiĉis por vidi ĉion - multaj ĉambroj pri la krimoj de la stalinisma (1940) kaj nazia (1941 - 1944) epokoj. Kiam en 1941 alvenis la germana armeo, okazis pogromo kontraŭ la judoj, kiun supozeble organizis la germanoj (laŭ vikipedio estas diversaj rakontoj). Dum tiuj 3 jaroj pluraj miloj da judoj estis mortigitaj en la fortikaĵo - parte altransportitaj el Parizo - jen pliaj detaloj: [https://de.wikipedia.org/wiki/Holocaust\\_in\\_Litauen](https://de.wikipedia.org/wiki/Holocaust_in_Litauen)

En la ekstera korto estas granda pentraĵo de ?; tie ni konatiĝis kun loka samideano (nomo ?), etnologo, kiu laboras en tiu muzeo. Sur granda herbejo ekster la fortikaĵo troviĝas giganta monumento.

Posttagmeze ni promenis laŭ Laisvės Aleo ĝis la granda ortodoksa preĝejo, kiu estis fermita. Nia buso al Varsovio, respektive Berlino ekveturis vespere.

Matene je 2a30 ni alvenis en Varsovio-Zachodna (okcidenta stacidomo por busoj kaj trajnoj). Mi daŭrigis je ĉirkaŭ 5 horoj trajne al Gdansko. Tie renkontis min Jagoda kaj Jozefo. Post malgranda promeno tra la malnova urbo (kie mi jam iam estis) ni veturis al Jozefo kaj Anna, kiuj tute afable gastigis min. Post granda matenmanĝo ni vizitis la novan kaj tre bonan Muzeon de la Dua Mondmilito: [https://de.wikipedia.org/wiki/Muzeum\\_II\\_Wojny\\_%C5%9Awiatowej](https://de.wikipedia.org/wiki/Muzeum_II_Wojny_%C5%9Awiatowej)

Tie estas ankaŭ rakonto pri la estiĝo de germana faŝisma diktaturo.

Mi devus iam reveni, ĉar mia dormemo bedaŭrinde ne permesis vidi ĉiujn prezentaĵojn tute intense, aŭ eĉ unu el la filmoj. Bone ke la pola parlamento subtenis la respondeculon, ne ŝanĝi la koncepton, kion poste deziris la nova PIS-registaro. Vespere ni kunsidis por babilo.

Je la alia tago matene mi uzis rektan, rapidan kaj tre trankvile veturantan trajnon al Katowice (tiu ne estis en la trajnoj de Interrail). Survoje preterpasis (denove) Malbork (la granda Marienburg de la Germana Ordeno). De Katowice estas malgranda distanco al Bieruń, partnera urbo de Gundelfingen/Breisgau. Tie gastigis min samideana familio de Mirka kaj Thomasz; ni promenis en alian parton de la urbeto, multe babilis kaj diskutis. Ankaŭ vizitis najbare loĝantan konatulon de tiu urba partnereco. Ni kune vizitis la tombon de lia edzino, sprita artistino, kiu mortis en la sama aĝo (73) pro la sama ovaria kancero kiel mia edzino, kaj havis la samajn simptomojn je intesto; kaj tro longe oni serĉis kaŭzon tie. Mi miris pri la pola kulturo ne nur havi tombo-ŝtonon sed kovri la tutan tombon pere de poluritaj ŝtonegoj.



Marienburg - Malbork - survoje al Gdansko


La lasta vizito estis ĉe Galina en Wrocław (Breslau). Ŝi laboras en la Ukraina Akademio de Sciencoj, sed pro la Rusa Milito ne povas labori tie; feliĉe en PAN ŝi kun kelkaj aliaj sciencistoj povas ankaŭ vivi en ties konstruaĵo. Krom babiladoj pri la familia kaj politika situacio vespere ni vizitis - kune kun la familio de nepo de Galina la historian (tre bone rekonstruitan post la Dua Mondmilito) urbocentron; tie promenadis multege da homoj. Ni vespermanĝis en historia restoracio. Dimanĉe frumatene mi promenis al la proksima Hidropolis - kie oni montras kiel trakti akvon bone - tie mi fotis ilian simbolon, similajn nanojn oni trovas ankaŭ aliloke: nano kiu akvumas fiŝeton (tute strange, ke preskaŭ je la sama tago komencis la mortado de fiŝoj en la Odro - pro aldono de tro granda kvanto da salumita akvo - eble el karbominejo (?) - ĉar estas malmulte da akvo, kaj alta temperaturo tie kreskis „ora algo“ kiu estas venena por la sensal-akvaj fiŝoj).

Poste ni vizitis la proksiman Zoo-ĝardenon, kie necesis trapasi la Odron. Tre bela zoo kaj laŭ mia kompreno afabla por la bestoj. Je tagmezo mi reiris al la stacidomo kaj revojaĝis al Bonn.

Manfred Westermayer,

Varsovia Okcidenta, matene nano antaŭ Heliopolis, Wroclavo

Kaunas - IX Fort - Murpentraĵo      Marienburg - Malbork - survoje de Gdansko

<b>Espéranto France-Est</b> http://esperanto.france.est.free.fr				<b>Orient-Franca Esperanto-Asocio</b>	
<b>La Informilo</b>		Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale <b>ESPERANTO</b>		Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo <b>ESPERANTO</b>	
<b>Rédaction:</b> <b>Redaktoro:</b>		Edmond Ludwig kaj André Grossmann		S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:		Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci		un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre	
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.					

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto <i>Président</i> kaj Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	09.86.38.78.61	andreo.ag18@sfr.fr
Aliaj komitatanoj  <i>Assesseurs</i>	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36 06 76 54 77 78	liliber54@yahoo.fr
	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.46.93	michelinecolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Michel Basso	03.89.80.86.12	clbm@orange.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello54@gmail.com
	S-ro Gilbert STAMMBACH	06 87 40 01 16	gilbert.stammach@gmail.com
	S-ro Joël FONTAINE	07 82 43 02 48	joel.fontaine@jfon.fr
S-ro Bruno HENRY			esperanto.bhenry@laposte.net

<b>Abono al La Informilo</b> →	19 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← <b>Abonnement à La Informilo</b>
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	<b>Esperanto France-Est</b>		← <b>Paiement par chèque au nom de</b>
Pagoj per ĝiro al jena konto →	<b>CCP 1997 72 W NANCY</b>		← <b>Paiement par virement au compte</b>
Per internacia ĝiro →	IBAN: FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC: PSSTFRPPNCY		
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

1. UK en Montrealo	15. Enigma + humuraĵoj	<b>ISSN 0291 6037 trimestriel</b> <b>N° CPPAP : 0409 G 83517</b> Bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle <b>Espéranto France-Est</b> MJC PhiJippe Desforges 27 rue de la République <b>54000 NANCY</b> Directeur de la publication : <b>Edmond LUDWIG</b> Rédacteur provisoire: André Grossmann Dépôt légal : <b>30 septembre 2013</b> <i>Imprimé par l'imprimerie Sprenger</i>
2. Amika tago en Sélestat	16. Festo de asocioj Nancy	
3. Renkontiĝo en Troyes	17. UK en Kanado	
4. BET-56 en Litovio	18. UK + UEA	
5. BET-56 en Litovio	19. Pikniko en Deneuvre-Baccarat	
6. Vojaĝo de Manfred	20. Itala kongreso	
7. Vojaĝo de Manfred	21. Itala kongreso	
8. Komitato kaj enhavo-listo	22. Itala kongreso	
9. Angulo de la prezidanto, retejo	23. Itala kongreso	
10. Lucien Cornet	24. Itala kongreso	
11. Sciencfikcia rakonto	25. Neresheim	
12. Invento de fridujoj	26. Gaja semajnfino en septembro	
13. Staĝo Métabief + Amika tago	27. Gaja semajnfino + humuraĵoj	
14. Libroservo	28. Nia foto-paĝo	



## ANGULO DE LA NUNA PREZIDANTO

**Estimataj gesamideanoj,**

Nia nuna epoko frontas al multaj obstakloj kaj malfacilaĵoj: pandemio, reapero de ekstrema naciismo kaj de milito en Eŭropo, ŝanĝiĝo de vetero kreanta ĉe ni pli kaj pli varmajn kaj sekajn somerojn, konsekvence plioftecon kaj ĝeneraligon de arbaraj incendioj kaj inverse pli oftajn pluvegojn kaj inundojn.

Tiuj ĉi eventoj ne helpas la pluvivigon de nia movado kaj ne subtenas nian optimismon!

Tamen dum tiuj lastaj semajnoj, io aparte plaĉis al mi. Post plur-taga grava arbar-brulego en sudokcidenta franca regiono, la ŝtato alvokis pri helpo la aliajn eŭropajn landojn. Tiam multaj respondis kaj sendis fajro-soldatojn kaj materialon: landoj kiuj malofte suferas tiajn katastrofojn, ankaŭ iuj ofte trafitaj de samaj incendioj, kiuj reciprokis pasintan helpon.

Feliĉe, ankaŭ la reveno de pluvo, kelkajn tagojn post la ricevo de helpo, multe efikis, sed certe la helpo de najbaroj kortuŝis la lokajn fajro-soldatojn kaj plukonvinkis multajn francojn pri la efikeco de eŭropa kunlaborado.

Same kiel la tuta mondo, nia movado multe suferis dum la tri lastaj jaroj kaj povis nur minimume funkcii. Tamen de post kelkaj monatoj, ĝi iom post iom revigliĝas. Kaj la eventoj lokaj kaj mondaj reaperas kaj komencas retrovi sian pasintan nivelon.

Loke, precipe plaĉis al mi ke samideanoj de nia “granda regiono” (mi daŭre pensas pri Alzaco Loreno, Luksemburgio, Sarlando, Palatinato, Baden-Virtembergo) akceptis trairi dekojn da kilometroj por partopreni en loka aranĝo de alia grupo kaj tiel plidikigi kaj internaciigi eventeton, kaj reoptimismigi ties organizantojn.

Same kiel en lukto kontraŭ fajro, helpo de esperantistoj, ankaŭ de momente pli viglaj grupoj, al najbaraj samideanoj, kelkfoje en malfavora situacio, helpas al pluvivigo de la ĝenerala movado.

Laŭ mi, ĉiam pli efikos kunlaborado kaj helpemo ol koncentriĝo sur si mem!

Jean-Luc Thibias

**Jen retejo, en kiu eblas elŝuti multajn Esperanto-gazetojn kaj bultenojn.**

<https://bitarkivo.org>

Poste alklaku malsupre de la paĝo por trovi liston de gazetoj laŭ la alfabeto.

Ĉe L-Z estas listigita La Informilo (LaInformiloFranceEst)

Tie aperas la numero 19 kaj poste ekde 55 ĝis la numero 192 en skanita formo.

50GB Tempaj Labordosieroj: [🔗](#)



<http://esperanto.france.est.free.fr/historio.htm>

Troviĝas informoj pri nia federacio de 1950 ĝis 2001 en formato htm. Plej ofte reskribo de la tiamaj numeroj de La Informilo.

Ekde 2002 ĉiuj numeroj estas komplete skanitaj.

Informoj ricevitaj de Jean-François Passarella

## Lucien CORNET (1865-1922) kaj Esperanto

La numero 1326 (1-a de marto 1865-17a de aŭgusto 2022) de la franclingva magazino "Marianne" aperigis dupaĝan artikolon de Bruno FULIGNI pri Lucien CORNET forpasinta antaŭ 100 jaroj.

Jen resumo de la artikolo: Lucien CORNET naskiĝis en Parizo la 1-an de marto 1865. Li estis la filo de man-laboristo, kiun ofte vizitis Léon GAMBETTA reklamante pri siaj respublikaj ideoj. Kaj sekve al tiu influo Lucien CORNET iĝis ĝisosta social-demokrato. Li kredis je la scienco, kiu ebligu venki malklerecon, reakciajn kaj klerikalajn ideojn. Li unue perlaboris sian vivon per reklamado pri kemiaj produktoj. Poste li malfermis drogerion en SENS (Departemento YONNE). Aĉetis ĉe li sterkaĵojn ĉiuj terkulturistoj de la regiono. Poste li iĝis prezidanto de la agrikultura sindikato. En 1892 li iĝis membro de la urba estraro kaj unu jaron poste urbestro de SENS. Li tiam konstruigis novan urbodomon, ŝparkason, kolegion por virinoj, reton de fluanta akvo kaj de defluantaĵoj.



Li iĝis deputito en 1896, tridek-unu-jara, kaj senatano en 1909. En tiuj asembleoj li klopodis devigi siajn kolegojn ĉeesti en ĉiuj sesioj. . . kion li ne sukcesis fari!

Nin certe interesas **lia iniciato de la jaro 1907**, kiam li deponis propozicion de rezolucio, kiu invitis la registaron enkonduki la internacian lingvon ESPERANTO en la programojn de la publika instruado kadre de la instruado de lingvoj.

Klarigante sian iniciaton li skribis: ***“Esperanto estos la latino de la demokratio. Ĝi internacie servos al ĝi kiel la latina lingvo servis al la religia socio de la Mezepoko. Jam iuj laboristaj grupigoj ĝin rimarkis kaj, en siaj kongresoj, ili decidis rekomendi la lernadon de Esperanto al ĉiuj sekretarioj de la naciaj sindikatoj [ . . . ] La konsekvencojn, kiujn Esperanto povas rezultigi por la alproksimigo de la popoloj kaj la progreso de la homa solidareco, apenaŭ eblas troigi. Labori por la triumfo de Esperanto signifas labori plej praktike kaj plej efike por paco kaj frateco universalaj. Akceptante tiun “genian lingvon, Francio simple konformiĝus al sia natura misio: daŭre avangardi en la progreso”.***



## Sciencfikcio

Pluraj aŭtoroj de scienc-fikcio imagis vojaĝojn en la tempo, ĉu al la pasinteco, ĉu al la futuro per ia tempo-maŝino. Evidentiĝis, ke okaze de vojaĝo al pasinteco, la vojaĝantoj povus iel interveni en la historio kaj eĉ provoki tempan kolizion kaj iel ŝanĝi la tutan postan historion.

La vojaĝoj al la futuro ne garantias, ke tia vidita futuro ja iam ekzistos.

Jen aŭtoro, kiu ne proponas vojaĝon tra la tempo, sed iun specialan ĉambron, "la tempejo" por tie bremsi aŭ eĉ akceli la tempon. Ĉu pli realisma aŭ tro fantazia?

Andreo

## La tempejo

Jam alvenis la printempo, la vetero fariĝis pli milda, la naturo montris siajn novajn kolorojn. Ĉio-ĉi ebligas iom forgesi la teruran vintron kun senfinaj frostaj tagoj.

Tamen Anita tute ne suferis pro tiu vintro, ŝi simple pretersaltis ĝin pasigante iom da tempo en la tempejo, tiuj specialaj ĉambroj, en kiuj la tempo estas bremsata aŭ kelkfoje akcelata. Tie ŝi pasigis iom da minutoj, dum ekstere kuradis la tagoj kaj noktoj, tiom rapide, ke post deko da minutoj jam pasis 5 monatoj ekstere. Elirante, ŝi alvenas en kvazaŭ alian mondon, kies novaĵojn ŝi ne konas, tial ŝi tuj aĉetas la gazeton, kiu resumas la novaĵojn de la lastaj monatoj. Ŝi ja ne povas relegi ĉiujn tag-ĵurnalojn de tiuj kvin monatoj.

- Saluton Anita, jam delonge mi ne vidis vin, ŝajne vi tute ne maljuniĝas. Ĉu vi forvojaĝis?

- *Saluton Roberto, jes mi estis kvazaŭ for. Vi ja scias, ke mi abomenas la vintron, tial mi preferis ĝin pretersalti en tempejo.*

- Se vi tiom ofte vizitas tiajn tempejojn vi baldaŭ estos pli juna al mi.

- *Jes, despli bone, mia speciala horloĝo montras mian kalendaran aĝon kaj mian biologian aĝon, kiuj jam diferencas de preskaŭ unu jaro.*

- Mi ne ŝatas tian tempejojn, ĉefe se mi devas resti en ĝi por gajni tempon.

- *Kion signifas tio?*

- Lastfoje mia estro postulis, ke mi rapide finu komputilan programon. Pro tio mi ja bezonus tutan semajnon aŭ eĉ pli. Li proponis, ke mi faru tion en la tempejo de la firmao. Tial mi ja pasigis tie tutan semajnon dum ekstere pasis nur kelkaj minutoj. Por mia estro la programo estis ja preta dek minutojn poste.

- *Vi kompatinda Roberto. Kaj konsekvence vi pli rapide maljuniĝis. Bonvolu rakonti pri la lastaj novaĵoj. En mia komputilo estis pli 250 mesaĝoj, mi ne havis tempon ilin konsulti kaj legi.*

- En nia Esperanto-grupo Katarina iĝis nia nova prezidantino. Dum la membro-kunveno vi ja ne ĉeestis, krome Katarina neniam forsaltas la vintron, ŝi ja ege ŝatas vintrajn sportojn. Tial vi maltrafis elektiĝi prezidantino.

- *Do, mi gratulas ŝin. Ŝi ja meritas tion, mi male povus estis prezidantino nur dum la 7 monatoj en jaro ekster la tempejo.*

- Laste mi legis, ke en Kanado oni planas instali tempejon en trajno. Tiam por vojaĝo, kiu kutime daŭras du aŭ eĉ tri tagojn, la vojaĝantoj en la tempejo pasigus nur iom da minutoj de Montrealo al Toronto.

- *Eble iam tiu inventaĵo povos kvazaŭ mallongigi la spac-vojaĝojn. Tiam ne plu estos problemo por kosmonaŭtoj pasigi monatojn por atingi marson, necesos malpli ol unu tago.*

- Finfine la homoj iĝas daŭre pli malpaciencaj, tiam ĉu ankaŭ en atendejoj ĉe kuracistoj oni metu tempejojn? Mia estro ŝatus proponi meti komputilon en la tempejon, por solvi la problemojn de la longaj komputiloj kalkuloj. Tamen restas problemo, ke dum la komputilo estas en la tempejo ne eblas komuniki kun la ekstera mondo. Tial necesas unue provizi la komputilon per multaj datenoj.

- *Jes, prefere la maŝinoj pli rapide "maljuniĝu" ol la homoj. Feliĉe mia kuzino restis ankaŭ du monatojn en la tempejo por prokrasti sian naskon. Supozeble tre baldaŭ ŝi naskos sian duan fileton. Mi ĝojos ekkoni tiun bebon. Kaj vi, ĉu vi ne havas emon pretersalti iun periodon de la jaro?*

- En periodo, kiam estas malpli streĉa laboro, mi volonte preter-saltos iom da tagoj, ĉefe se la vetero estas aĉa.

Aleksandro Gono



## El Svedio Gunnar rakontas pri la invento de fridujoj

*Du junaj studentoj, Baltzar von Platen kaj Carl Munters, studis en KTH, Teknika Altlernejo/Stockholm. Ili konatiĝis en la manĝejo kaj poste luis komunan loĝejon, kie ili ankaŭ faris eksperimentojn. Ilia celo estis krei ion novan kaj miksis diversajn fluidaĵojn, kiujn ili varmigis por atingi malvarmon. Printempe de 1922 ili prezentis sian inventon, kiu estis ilia ekzamena laboro. Jen moderna, malgranda fridujo!*

**Carl Munters**



*Ili estis saĝaj kaj tuj fondis entreprenon kaj ricevis patenton. Sed Electrolux rapide aĉetis la rajton kontraŭ unu miliono, kio devis esti tre alta sumo tiam. Por ĉiu vendita fridujo ili ankaŭ ricevis 50 oerojn (50 öre = 1/2 krono) kaj dungigis en la esplor- kaj evolu-centro de Electrolux. Ekde 1925 fridujoj vendiĝis en butikoj.*

*Kio mirigas min estas, ke tiu unua fridujo ankoraŭ ekzistas! Oni instalas ĝin en la grand-bieno Ankarsrum, malgranda loko en la provinco Småland. Nun tiu fridujo staras en la fabrik-muzeo. Ĝi havas la saman formon kiel mia moderna, nur iom malpli granda, estas blanka kaj havas du pordojn! Jam en 1655 oni startis fer-industrion tie (järnbruk) kaj dum jarcentoj tre variaj objektoj kaj maŝinoj estas produktitaj tie. Nuntempe la tiea*

*industrio produktas maŝinojn por kuirejoj: Hushållsassistenten.*

*Se vi posedas loĝ-vagonon eble la fridujo estas markita Electrolux. Ĝi funkcias per gaso/12V/220V sed la principo identas kun la unua invento. Ankaŭ en hotelĉambroj vi trovas ilin: malgrandaj kaj laboras tute silente! Por ŝpari energion nunaj funkcias per pumpilo kaj kompresoro.*

*Laŭ mia kompreno Electrolux fermis ĉiujn fabrikojn en Svedujo. Kostas tro!! En Mariestad, najbara urbo, estis granda fabriko kun preskaŭ 2000 laboristoj, kiun oni fermis antaŭ deko da jaroj. Iama grava landa industrio fariĝis monda aventuro!*

*Certe, jam ekzistis speco da fridujoj, ekz. en restoracioj, kiuj funkciis per glacio. Vintre oni elsegis glaciblokojn en lagoj (la plej komplikan taskon havis la helpsegisto, kiu laboris sub la glacio), stokis ilin en seĝoj (sego-splitaĵoj) kaj liveris al mendintoj.*

*Cetere Ankarsrum troviĝas en "la mondo de Astrid Lindgren". Somere vi povas veturi per vapor-trajno en la regiono kaj dum kelkaj tagoj en julio/aŭgusto renkontiĝas ŝatantoj de diatonikaj akordeonoj por komune ludi en la bela grandbiena parko.*

*Lingve "bruk" estas interesa fenomeno kaj mi ne trovas ekvivalenton en Esperanto. Ĝi povas esti memstara vorto sed ankaŭ aŭ sufikso aŭ prefikso. Amase da kombinoj eblas. Vi jam konas järnbruk, glasbruk (vitro), skogsbruk (arbaroj), jordbruk (agrikulturo), brukspatron (posedanto kaj ĉefo) ktp ktp. Bruksort estas loko kun iu "bruk", bruksorkester (loka blorkestro), bruksföremål (ia uzebla ilo).... Vi jam komprenas la ideon: facila maniero krei novan vorton kun precizeco!*

*La entreprenisto Louis de Geer venis el Nederlando al Lesjöfors en la jaro 1627 kaj startis la tiean industrion (järnbruk) kiu ankoraŭ restas tie en eta fabriko. La grandaj fabrikoj troviĝas eksterlande. Se vi interesiĝas pri ŝtalproduktoj vi trovas amase da tiaj, tre variaj objektoj en la muzeo. Ankaŭ Esperantogården troviĝas tie (tamen ne en la muzeo!).*

### Kungliga Tekniska högskolan



Unuaj fridujoj kun varm-interŝanĝilo supre

## Staĝo en Métabief de la 20a ĝis la 27a de aŭgusto 2022



La staĝo de Métabief estas ŝatata de multaj samideanoj, sed ĉi-jare ĝi okazis en la sama semajno kiel la itala kongreso en Breŝio. Tial por iuj esperantistoj necesis decidi inter tiuj du aranĝoj.

### Mateo rakontas pri la Amika Tago en Sélestat kaj pri siaj spertoj

La Amika Tago de junio en Sélestat, evento kiun partoprenis pluraj Esperantistoj el kvar landoj (eble eĉ pli!), estis bela okazo por revidi aŭ renkonti aliajn samideanojn.

Mia tago komenciĝis en Nancio, kie mi trovis aliajn esperantistojn. Kune, ni aŭtis ĝis Sélestat. Ni trovis parkejon, kaj poste iris al la trajn-stacio. "Saluton!" tie kaj tie. Tie kaj tie kelkaj verdaj steloj. Iom post iom aliaj homoj alvenis, kaj ni kunparolis. Dum tiu tempo, policistoj rigardis la aŭtojn antaŭ la stacio-domo kaj komencis skribi monpunojn. Do, ni ekpensis, ke ĉiuj, kiuj havas aŭton prefere rapide foriru!

Ni kuniĝis en alia parkejo kaj ekmarŝis tra la urbo. Mi tre ŝatas tiujn momentojn inter aktivaĵoj, ĉar estas ofte la bona momento por renkonti la aliajn partoprenantojn.

Poste, la grupo haltis antaŭ malnova domo. Eble pro la varmeco, eble pro vortoj, kiujn mi ne konas, mi honeste ne memoras kial tiu domo gravas. Nek kial la sekva domo gravas. Sed, mi memoras, ke iu klarigis, ke en sia pasinteco, la urbo apartenis al Germanujo, kaj dum aliaj epokoj, al Francujo. Tiuj domoj montris tiujn epokojn tra iliaj arkitekturoj, kiuj malsamas.

Nia promenado pluiris, ni vidis aliajn konstruaĵojn, preĝejon, bazar-placon, kanalon, kaj ĉirkaŭ la tagmezo, ni trovis parkon, kie ni kunmanĝis kaj kunparolis.

Post nia manĝo, ni iris al humanisma muzeo. Tie troviĝas multaj malnovaj libroj kaj aliaj dokumentoj, skribitaj de filozofoj kaj aŭtoroj.

Kiam ni finlegis pri la libroj, ni sidiĝis en la placo proksime de la muzeo kaj trinkis aŭ manĝis ion. La plejparto el la partoprenantoj iris al la pan-muzeo, sed mi iris al la arta muzeo (FRAC) kun mia amikino. Tie estis ekspozicio de Charlemagne Palestine. Ĉie, vere ĉie, estis centoj da pluŝ-ursetoj! Surprizantaj kaj interesaj!

Poste, kelkaj homoj restis, kaj aliaj, inklude la nancia grupo foriris.

Jen unu subjekta priskribo de la Amika Tago. Unu fina penso: laŭ mi, la plej grava afero, ne estis kien ni iris, kion ni vidis, faris, aŭ manĝis. Por mi, gravas havi tempon kun aliaj esperantistoj por paroli kaj lerni! Kaj feliĉe, la spertuloj helpis komencantojn, kiel min.

Unu Amika Tago farita el multaj belaj spertoj!

\*Mateo\*



# El nia libroservo

## Informoj



⇒ Kiel jam kutime, ni esperas, ke ni povos organizi en Art Sur Meurthe, dum venonta printempo la tradician komunan esperanto-semajnfino de EFE kaj Bavelo, Se la evento eblos, tiam la libroservo partoprenos kun ĉiuj siaj disponeblaj titoloj, do pli ol 800 !

Informoj aperos en la retejo [esperanto.france.est.free.fr](http://esperanto.france.est.free.fr)


Ĝis baldaŭ

Jean-Luc Thibias

[libroservo.efe@laposte.net](mailto:libroservo.efe@laposte.net)



## Nove alvenintaj libroj



①



②

**1. Frankenŝtajno aŭ la moderna Promoteo, Romano, Mary Shelley, Flandra Esperanto Ligo. 2022, 186 p. 14 €.**

Kiu ne konas Frankenŝtajnon? Aŭ pli precize, la monstron kiun li kreis? Sed, ĉu vere ĝi estis monstro? Frankenŝtajno estas klasikaĵo de la angla literaturo, kiu kunigas la ĝenrojn de gotikismo kaj romantikismo. La verkinto, Mary Shelley, filino de filozofo, estis nur 18-jaraĝa kiam ŝi verkis la romanon. Viktor Frankenŝtajn estas junulo el Ĝenevo. Dum siaj studoj ĉe la Universitato de Ingolstadt en Bavario, li malkovras "la kaŭzon de generiĝo kaj vivo". "Ne, pli ol tio! Mi eĉ fariĝis kapabla enanimigi senvivan materion." Nerezistebla impulso pelas lin konstrui homan korpon, per korpo-partoj de kadavroj, kaj vivigi ĝin. Bedaŭrinde, li sukcesas.

La ĵus vivigita estulo, konfuzite, forfuĝas. Li scias nenion, kaj devas mem lerni ĉion de nulo. Komence, li deziras esti akceptata de la homoj, sed pro sia horore malbela vizaĝo, li estas kruele forpelita de ĉiuj. En mizero, li serĉas sian kreinton, kaj minacas lin per murda venĝo. (el retejo de F.E.L.)

**2. Pri kio temas?, lernilo, Szabolcs Sylva, Warszawa 2020, 175 p. 11,50 €.**

Ellaboraĵo de la 15 temoj de B2-nivela KER ekzameno, La libro celas precipe tiujn, kiuj volas atingi nivelon B2. Dividita en 15 ĉapitroj. la libro abundas je ekzemploj kaj ekzercoj, (el retejo de U.E.A.).

### Por mendi librojn:

1. Vi sendas vian mendon


- perpoŝte al: Libroservo 37 rue Pierre et Marie Curie FR-54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉi-suban mendilon)
- per ret-poŝto al "[libroservo.efe@laposte.net](mailto:libroservo.efe@laposte.net)" - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54

2. Vi baldaŭ ricevos la librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj), pagenda (indikante faktur-numeron) ĉu per:

- franca ĉeko je "Esperanto France Est" sendita al la supra adreso
- poŝta ĝiro al "Esperanto France Est" CCP 0 1997 72W NANCY"
- interbanka ĝiro al "Esperanto France Est" IBAN FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC PSSTFRPPNCY.

Mendilo		Bonvolu sendi tiujn librojn al apuda adreso:
S-ro / S-ino		
En		Subskribo:
la		

## Ni lernu per enigmo kaj humuraĵoj



JG

La edzo profunde dormas en fotelo antaŭ la funkcianta televidilo. . .

Dume la edzino duon-laŭte babilas kun invitita amikino.

*"Vidu, mi kapablas diveni pri kio li sonĝas, nur okulumante al lia vizaĝo. Momente lia rideto signifas, ke li sonĝas pri la fridujo, en kiu li trovos bongustan ŝinko-tranĉaĵojn, tuj post sia vekigo. . . kaj nun temas pri vera ĝojo. . . li ja komencas prepari sandviĉon. . ."*

*- Nu, kio okazas, Monika, via edzo aspektas nun malkontenta! "Jes, mi memoras, ke mi forĝesis reaĉeti majonezon! . . ."*

Juna oficistino estis ĵus dungita en banko pro siaj scioj en komputiko. . .

Ŝi estas invitita reordigi la klarigojn sur la ekrano de la ekstera bank-aŭtomato.

lom poste funkcias denove la aparato.

lu kliento, kiu ĵus ricevis la petiton mon-biletojn, legas sur la eta ekrano:

1 *Se vi deziras ricev-atestilon premu la bluan klavon . . . .*

Tion li faras.

2 *Forprenu vian banko-karton.*

Antaŭ ol ŝovi ĝin en sian monujon, li surprize legas sur la eta paper-atestilo;

*"Por inteligente uzi tiun monon, voku telefone Patricia.04 52 74 17 07"*

### Rusaj fiŝkaptistoj

Mikaelo telefonas al sia amiko.

*"- Ĉu vi pretas por nia kutima fiŝkatado?"*

*- Ĉi-matene mi ne venos. Mia edzino permesas, ke mi hejme trinku la vodkon."*

### HORIZONTALE

1. Interna varm' de la korpo.
2. lianco aŭ ligo. Vic' da analogaj aferoj.
3. Komiks'.
4. Regul' de sinteno en formalaj cirkonstancoj. Eŭropa ĉefurb'.
5. Kapo de taŭro. Kristnaskarb'.
6. Kapuĉ'. Numeralo.
7. INVERSE: Absoluta malpermes' fari iun aferon. Inklin' al persono. Litera nomo.
8. INV: Natria klorid'. Specialist' pri la formo kaj la strukturo de humaj korpoj.
9. Fino de la nokto. Serio da muskulaj konvulsiaj movoj.
10. Atenta penado certigi ies feliĉon. Band' aŭ team'.

### VERTIKALE

1. Ftiz'.
2. INV: Insekt', kiu manĝas ŝtofon. Supera plata parto de kolona ka
3. Klerik' en armeo.
4. Sonregistraj' liverata per Interreto. Kapo de ogro.
5. Prefikso montranta ripeton.
6. Kapuĉ' permesante anonimecon.
7. Centro de tasko. Planed' de la sunsistemo.
8. Speklativa rezonado aŭ klarigo. Firma uj' el ledo por mane tran
9. Ujo por kolekti voĉdonilojn. Grizeta, malmola metalo.
10. Perioda melodias reveno de la tonoj en muzikaĵo. INV: Frukto.



### SOLVO de KVE 198:

#### HORIZONTALE:

1. BRADIKARDI.
2. RETINITO.
3. APERTUR. KO.
4. KEL. IROK.
5. TITRO. BRU.
6. FIEREGO. EL.
7. TREZORO.
8. DO. POLTRON.
9. ORTA. ONRU.
10. UNGO. EK.
11. MOTORVAGON.

#### VERTIKALE:

1. BRAK. DORM.
2. REPETITOR.
3. ATELIER. TUT.
4. DIR. TREPANO.
5. INTEREZO. GR.
6. KIU. OGOL. OV.
7. ATRI. ORTO.
8. RO. RB. ORNEG.
9. KORE. ORKO. INOKUL. NU.

## Festo de asocioj en Nancy la 17an de septembro 2022

De almenaŭ tri jaroj, la grupo de Nancio ne povis partopreni en tiun tradician eventon, dum kiu ĉiuj nanciaj asocioj povas prezenti sian agadon.

Kiel lastjare, la invito ne atingis nin sed ni povis ĝustatempe kontakti la urban servon kaj ricevis lokon inter 150 aliaj asocioj. Partoprenis Liliane, Yohan, Matthew kaj mi mem.

Kutime la evento okazas en Parko de “la Pepinière”, foje en la kongresejo. Ĉi foje sur “Place de la Carrière”, apud “Place Stanislas”. La urbestro ja havis la bonan ideon konservi dum unu plia semajno la tendegon uzitan por la literatura salono “Le livre sur la Place”.

La asocioj trovis do bonan ŝirmilon kontraŭ la pluvo (kiu ĵus reaperis post du-monata feriado), kvankam estis iom malvarme (ne kredeble!) frumatene.

La festejo troviĝis en strategia loko en la plej turisma loko de la urbo. Samtempe estis “Tago de la Heredaĵo”. Do, aŭskultema publiko alfluis, despli ke la publikaj transportoj estas nun senpagaj en la urbaro dum la semajnfinoj!

Pro manko de spaco, ni ricevis nur du tablojn kaj ne eblis alkroĉi ien afiŝojn, Do ni prezentis nur kelkajn librojn kaj revuojn. Sed ni povis uzi nian tradician tabulon por klarigi la mekanismon de la lingvo.

Inter la multaj pasantoj, kelkaj (dek, dudek?) atente aŭskultis nian prezentadon: junuloj, plenkreskuloj, infanoj, iuj kiuj neniam aŭdis pri esperanto, aliaj kiuj jam havas solidajn informojn, tiuj kies familiano iam studis la lingvon. . Pluraj sin anoncis pretaj veni al nia prezentado en la junuldomo la 5an de oktobro (ni vidos!).

Du apartaj aŭskultantoj: unu profesia turisma gvidistino de Saarbrücken, kiu miris, ke ankaŭ ĉi tie estas prezento pri Esperanto. Ŝi petis de mi la adreson de esperantaj grupo aŭ aktivuloj de Sarlando por kontakti ilin. Mi kompreneble donis tiujn informojn aperantaj en malnova papera jarlibro.

Alia estis la urbestro mem, sinjoro Klein, kiu, sola, vizitis unu post la alia la diversajn budojn, Li afable (ĉu intereso-plene?) aŭskultis miajn per-tabulajn informojn dum deko da minutoj.

Rezulto de tiu tago: ĉu venos amasoj da novaj membroj al nia movado? Eble ne. Eble ne tuj! Sed almenaŭ, ni dissemis kelkajn grajnoj, kiuj eble poste ĝermos. Kaj ni reaktivis kontakton kun aliaj asocioj kaj kun la urbaj skipoj. Ni refortigis nian entuziasmon. . .

kaj ni pasigis agrablan tagon!

J. L. Thibias





## 107-a Universala Kongreso en Montrealo

La Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo estis unue planita en 2020, finfine ĝi povis okazi en 2022 ne nur per zoom sed ankaŭ en reala ĉeesto.

La Solena Inaŭguro okazis en la salono "Zamenhof" (Teatro Cinéma Imperial, 1430, rue de Bleury, Montreal, ). Sur la Placo de Festivaloj (Place des Festivals), sur la granda ŝtuparo estis farita la komuna foto (paĝo 1)



La Kongresa temo estis Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj. Pri la kongreso kaj pri tiu temo raportas Serejo, kiuj travivis konkretajn kontaktojn.

Pro la fakto, ke la kongresa temo estis: "Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj", alligis al UK en Montrealo, kelkaj reprezentantoj de diversaj indiĝenaj popoloj, precipe el Kanado, Usono, kaj Latinameriko, ĉefe Sudameriko.

Bonŝance por la kongresanoj, precipe por mi, estis ankaŭ la okazigo de la "32-a Festival International PRÉSENCE AUTOCHTONE", kiu ebligis al ni persone, vidi kaj sperti multajn aferojn rilatajn al la vivo de la indiĝenoj, sur la stratoj de la Placo de la Festivaloj, en Montrealo.

Mi mem alparolis indiĝeninon el Kanado, kiu rakontis al mi, pri la ĝojo, kiun ŝi sentas, kiam la regiono, en kiu ŝi vivas dum 6 monatoj estas kovrita je neĝo. Ŝi rakontis pri la ĝojo ludi en la neĝo kaj vivi en pura naturo. Ŝi klarigis, ke ŝiaj vestaĵoj kaj ŝuoj, estas faritaj el urso felo, ĉar dum tiu periodo, la temperaturo ĉiam estas multajn gradojn sub nulo. Krome ŝi ankaŭ konfesis, ke la temperaturo en Montrealo dum la tagoj de la festivalo, estis por ŝi vere tre varmega. Mi ankaŭ havis la bonŝancon spekti prezentadon de tipaj indiĝenaj dancoj faritaj kune kun la spektantoj.

Okaze de la solena malfermo de la UK, mi miris ke, brazila Indiĝeno, nome "Jaboti", salutis la kongresanojn en Esperanto kaj en sia Indiĝena lingvo.

Poste, persone li rakontis al mi, ke li estis ĵus alveninta de Brazilo al Montrealo, kaj estis tre laca pro la flugo.

Post la solena malfermo, la partoprenantoj estis alvokitaj al la Placo de Festivaloj, por komuna fotado. Je tiu momento, mi kaptis la okazon kaj faris privatan foton kun "Jaboti" kaj alia samideano el Usono, nome, s-ro Wom-Gill.

Mi restis en Montrealo por la UK, kaj dimanĉe, la 14-a de Aŭgusto de 2022, mi ĉeestis la faman, "Parado da la Nacioj", kiu montras ĉiu-jare folklorajn grupojn el la diversaj nacioj kaj popoloj, kiuj vivas en Kanado.

Tre bela, impona, muzikplena, multkolora, vidinda kaj gajiga okazaĵo.

Lunde, la 15-an de Aŭgusto 2022, mi forlasis Kanadon, kun multaj agrablaj rememoroj pri la travivitaj momentoj kaj hejmen flugis al Germanujo/Frankfurto.



Jaboti kaj s-ro Wom-Gill

Fotoj kaj raporto de Serejo



## Nova teatraĵo furoris en Esperanto

Nova teatraĵo debutis dum la 107-a Universala Kongreso en Montrealo, en la ĉefa teatrejo de la kongreso, la historia teatro Cinéma Impérial. La aŭtorino (Ĵenja Amis) “revenigas” el pasinteco s-ron Mann por paroli pri la Internacia Kongreso de Esperanto de la jaro 1910 en Vaŝingtono – kongreso, kiun ĉeestis L.L. Zamenhof.



## Teritoria agnosko de la 107a Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo

Karaj kongresanoj, estimataj honoraj gastoj, Ni kunvenas hodiaŭ sur indiĝena tero, kiun neniam forcedis la diversaj indiĝenaj nacioj, kiuj jam de antikvaj tempoj vivas, vojaĝas, renkontiĝas kaj intertraktas en ĉi tiu regiono, apud la riverego kiu fluas de la Grandaj Lagoj al la Atlantika Maro. La Solena Inaŭguro de nia kongreso okazas ĝuste 321 jarojn post la fino de grandega pac-konferenco inter la francaj koloniistoj kaj la indiĝenaj nacioj de tiu tuta regiono.

Dum la Internacia Tago de Indiĝenaj Lingvoj, la 9-an de aŭgusto, ni fieris prezenti al vi aron da filmoj faritaj de kanadaj indiĝenaj filmfaristoj.

N-ro 1065 2022-09-05

### Gazetaraj Komunikoj de UEA

#### PARTOPRENU EN DUOLINGO-KUNVENOJ: NOVA AGADO DE UEA KAJ TEJO

Duolingo havas eblecon, kiun malmulte da homoj konas: la retajn kunvenojn. Se vi lernas Esperanton per Duolingo kaj volas plibonigi vian kapablon paroli en la lingvo, profitu de tiu ĉi nova agado de UEA kaj TEJO: ni okazigos paroligajn renkontiĝojn per la sistemo de Duolingo, en kiuj vi povos partopreni ĉiusemajne kaj babilu pri malsamaj temoj kun aliaj Esperantistoj el diversaj landoj. Se vi bone parolas Esperanton, sin proponu por helpi kungvidi la babilkunsidojn en Duolingo.

La paroligaj kunsidoj daŭros 30 minutojn kaj okazos per Zoom. Vi povas kontroli la eblecojn ĉe [classes.duolingo.com](https://classes.duolingo.com). La nomo de niaj kunvenoj estas "Babilu kun amikemaj esperantistoj" kaj dum 10 sinsekvaj semajnoj estas planataj kunvenoj, kiuj komenciĝos la 12-an de septembro. Ĉiuj, kiuj partoprenas en tia sesio, ricevas 250 poentojn per la sistemo de Duolingo! Aldone estas diversaj aliaj kunvenoj por lernantoj de Esperanto, kiel la lecionoj pri gramatiko gvidataj de Anna Lowenstein nome de la Londona Esperanto-klubo (tiuj okazas en la angla) kaj multaj aliaj. La lecionoj de la klubo ligiĝas al alia grava agado lanĉita ankaŭ ĉi-monate: la retaj Esperanto-kursoj por komencantoj (A1) ĝis progresintoj (C1): [londonaesperantoklubo.c!om/Online EsperantoCourses.html](https://londonaesperantoklubo.c!om/Online%20EsperantoCourses.html).

Se vi jam parolas Esperanton flue kaj volas kunlabori kun la kunvenoj "Babilu kun amikemaj esperantistoj", kontaktu la komisiiton de UEA kaj TEJO pri tiu reta agado, Karina Oliveira, per la retadreso [kgsoliveira@gmail.com](mailto:kgsoliveira@gmail.com) aŭ per Telegramo (@librulino). La kunlaborantoj devos nur veni kaj respondecu dum 20 minutoj pri paroligo de la lernantoj en malgrandaj grupoj laŭ la rimedoj de Zoom. Karina zorgos pri ĉio teknike kaj enhave.

Se vi volas subteni la agadon pri membro-varbado de UEA kaj TEJO, vi bonvenas donaci al Fondaĵo Canuto: [uea.org/alighoj/donacoj/canuto](https://uea.org/alighoj/donacoj/canuto). Tio subtenos la aliĝon de komencantoj en UEA kaj TEJO.

## Esperanto-pikniko en Deneuvre-Baccarat la 21an de aŭgusto 2022

Kial en vilaĝo de 500 loĝantoj situanta apud la urbeto Baccarat (monde konata pro ĝia kristal-produktaĵoj) troviĝas muzeo pri Herkulo?

Ĉar tiu vilaĝo multe pli aĝas ol ĝia najbaro! Jam ekzistinta dum la gaŭla tempo, ĝi konstruis dum la romia periodo adorejon pri Herkulo fariĝinta pilgrimejo. La afero prosperis ĝis la alveno de Kristismo kaj ĝermanaj invadoj, kiuj detruis la lokon. Tiun oni elteris el forgeso per arkeologiaj elfosaĵoj nur ekde 1974.

Deneuvre tamen pluvisis dum la Mezepoko. En 1764, estis decidite krei vitro-fabrikon en ĝia ekstera kvartalo nomita Baccarat. Fariĝinte kristal-fabrike, tiu entrepreno tiom prosperis, ke Baccarat fariĝis pli granda ol ĝia patra najbaro!

Do jen interesa loko por piknika tago!

Liliane Bersweiler okupiĝis pri la organizado.

Kaj venis el Nancy, Metz, Strasbourg kaj aliaj lokoj de la regiono dekkvino da samideanoj, Inge kaj Jürgen el Bavelio internaciigis la renkonton!


Matene: vizito al la Muzeo pri Herkulo kaj al la preĝejo de Baccarat moderne rekonstruita post ĝia detruo dum la dua mondmilito,  
Posttagmeze: vizito al la muzeo pri kristalo kaj al la galerio pri juveloj (kun belega ekzpozicio de regionaj art-produktaĵoj)

Intertempe: babilada pikniko, sub sun-ombrelaj arboj ĉe la bordo de rivero Meŭrto (eĉ ne sekigita!).

Fine: agrabla ĝisrevida kunveneto en trinkejo, kie Liliane disdonacis amikan tagon!

Kie kaj kiam la venontaj piknikoj?

JLT



### La franca Kulturdomo Greziljono invitas vin dum la ferioj (francaj)

- 2022-okt-14/16 [Staĝo de DANCOJ](#) bulgaraj, rumanaj, hungaraj
- 2022-okt-17/nov-03 [Volontulaj laboroj](#) por purigi kaj ripari la **basenon**
- 2022-okt-17/24 [BEMI-Semajno](#) de E-lingvaj biciklistoj kaj piedmigrantoj kun *Olivier Buisson*
- 2022-okt-18/23 [Korusa renkonto](#) de *Interkant* kun *Zdravka Bojĉeva*
- 2022-okt-21/23 [Post-Somera Universitato de EDE](#)
- 2022-okt-24 / nov-03 [AŬTUNE](#), la Esperanto-ferioj, kursoj kun *Anna Löwenstein*, *Murat Özdizdar*
  - Anna Löwenstein (Anglujo) literaturo, verkado, gramatiko (B2-C1)
  - Murat Özdizdar (Turkujo) Nova metodo de Murat (B1-B2)
  - I.U. : Kurso por komencantoj (A1-A2)
  - Elisabeth Barbay : Praktikado de Esperanto per ludoj kun infanoj *atm* \*\*



89-A  
ITALA KONGRESO  
DE ESPERANTO



kunlabore kun:



sub la patronado de:



## 89-a Itala Kongreso de Esperanto en Breŝo de la 20a ĝis la 27a de aŭgusto 2022

La itala kongreso okazis ĉi-jare de la 20a ĝis la 27a de aŭgusto, dum tuta semajno. Ĝi estas kvazaŭ imitaĵo de UK, kun prelegoj kaj pluraj ekskursoj tut-tagaj kaj duon-tagaj. Partoprenis pli ol 200 partoprenatoj. El Pollando venis tuta grupo ĉefe por lerni la lingvon.

En la hotelo Ambasciatori okazis plej multaj prelegoj. Tamen la inaŭguro okazis en la Aŭditorio San Bernarda en la urbo-centro. (Foto ĉi-supre). Pluraj partoprenantoj estis jam konataj, ĉu el antaŭaj kongresoj aŭ internaciaj semajnoj, tial eblis ĝui vere amikan kaj internacian etoson.

Por la fest-prelego intervenis François Lo Jocomo, ni ricevis informojn pri la ekskursoj, pri la kursoj kaj salutis landaj reprezentantoj.

Krome la distraj vesperoj okazis en iu bele ornamita korto en la urbo. Ilin ĉeestis ne nur kongresanoj, sed ankaŭ la ekstera publiko. Jes, estis bona reklamo farita en la urbo Breŝo.



Por la vizito al Breŝo ni rendevuis ĉe romia restaĵo. Ni ricevis bonajn klarigojn de profesia ĉiĉeronino, kiujn Emmanuele lerte interpretis. La origino de Breŝo situas ĉirkaŭ 1200.a.K. Pli poste Brixia estis aneksita al la Romia respubliko ĝis 568. Post ducent-jara regado de Milano, Breŝo apartenis al Venecia Respubliko de 1426 ĝis 1797, tiam ĝi pliriĉiĝis, kaj estis konstruitaj multaj palacoj, renesancaj domoj, kaj katedraloj.




Ni tra-promenis la urbon kaj la jarcentojn de Romiaj Ruinoj ĝis la riĉa renesanca periodo kun belaj placoj kaj konstruaĵoj.

Ĉe la placo Paŭlo la 6a eblis admiri la mez-epokan rondan katedralon el brikoj kun kriptoj.

Apude troviĝis la nova preĝejo de la renesanco (1604-1825) kaj iam apude la malnova urbodomo.

Ĉe la placo de la Loĝio troviĝas la moderna urbodomo, signo de la riĉa epoko de la Venecia Respubliko.



La distraj vesperoj okazis en ĉarma placo Broletto ekster la kongresejo. La celo estis allogi la eksteran publikon. Feliĉe regulaj aŭtobusoj veturis de la hotelo al tiu placo.

En dimanĉo Jomo lerte plenigis la vesperon per siaj plur-lingvaj kantoj.

En aliaj vesperoj okazis teatraĵoj en la itala. Marde eblis ĝui la kantojn de Piero Nissim en Esperanto kaj en la hebrea. Okazis ankaŭ koncerto de Kjara Raggi, de la grupo "Kim kaj Radio Mondo".



Jen Sirmione ĉe la lago de Garda, la celo de nia tut-taga ekskurso. En apartaj grupoj ni vizitis la hejmmuzeon de la poeto Gabriele d'Annunzio. Ni povis admiri plurajn ĉambrojn, ofte plen-plenajn je mirindaj skulpataĵoj, je muzikiloj, je pentraĵoj, laŭ la temoj de la ĉambroj. Tamen la poeto estis izolulo, manĝis sola en




unu sia ĉambro. En alia ĉambro li tamen akceptis siajn gastojn. La vizito okazis en etaj grupoj, kiuj ne ĉiuj povis ĝui la lertan interpretadon de Emanuele, bedaŭrinde.

Post komuna tagmanĝo eblis ĝui la ĉarman panoramon de la Garda Lago



Li studis en Florenco kaj ĉe la universitato de Romo. Kiel 16-jaraĝulo li publikigis sian unuan lirikaĵaron *Primo vere* presotan je propra kosto. Ĝi tre imitis la poezion de Giosue Carducci. En 1881 li setlis en Romo, kie li deĵoris ĵurnaliste por la gazeto *Tribuna* ĝis la 1889 gajnante aliron al la nobela socio. Unu jaron poste li famiĝis per la poema kolekto *Canto nuovo* (1882). Tiuj poemoj laŭdas la ĝojojn de la vivo kaj provas apliki novan, elitajn lingvostilon





Merkrede la ekskurso celis la Kamunan valon kaj la lagon de Iseo.

Profunde en la valo ni alvenis per buso al la eta vilaĝo Ceto, inter imponaj monto-pintoj. Post la eniro al la muzeo necesis unu hora promenado por atingi la lokon, kie eblis admiri la sur-rokajn gravuraĵojn.

Feliĉe la ĉiĉeronino verŝis iom da akvo por pli bone vidigi tiujn gravuraĵojn, kiuj estis faritaj dum la fera kaj la bronza epokoj. Ŝi sukcesis klarigi iliajn signifojn. Ofte temis pri milit-estro kaj soldatoj. Ankaŭ aperis birdoj kaj ofte la suno. En tiu valo majeste kaj impone staras la mont-pintoj, maldekstre ŝajne "virina" kaj dekstre "vira", kiuj tre verŝajne iel influis la homojn de tiu pra-epoko.

En la posttagmezo ni ĝuis la lagon Iseo, per pramŝipo ni atingis la grandan insulon Sale. Ĝi aspektis kiel monto sur la lago. Necesis nur dek minutojn po atingi ĝin kaj poste ĝui la panoramon ĉe biero aŭ glaciaĵo. Jen amika rondo sur la insulo.



En ĵaŭdo estis proponita vizito al vin-produktejo "Franciacorta". Tie oni produktas ŝaŭm-vinojn, kiuj same kiel "Ĉampano" en Francio kaj "Cava" en Hispanio, ne bezonas mencii, ke ja temas pri ŝaŭm-vino. Tiuj vinoj restas almenaŭ dum 3 jaroj en kuŝantaj boteloj. Poste la boteloj estas renversitaj kaj per frostiga metodo oni sukcesas forigi la restaĵojn. La tuta grupo povis gustumi tri vinojn du blankajn kaj unu ruĝan



Fotoj kaj teksto de Andrea



## La 89-a Itala Kongreso de Esperanto en Breŝo 20-27. 8. 2022

raportas Liba Gabalda

Ĉi-foje ĝi okazis en la itala urbo Breŝo (Brescia) situanta en la norda parto de Italio, regiono de Lombardio, inter Milano kaj Verono. Apud la kastelo, kiu dominas la urbon staras vapor-lokomotivo. La kongresejo troviĝis en la hotelo Ambasciatori. En la enirhalo instaligis akceptejo kaj libroservo.



Al la evento aliĝis pli ol 200 geesperantistoj, sed ne ĉiuj povis veni. Teresa Pomorska el

Pollando venigis grupon de 27 adeptoj por Esperanto, kiuj entuziasme frekventis la Esperanto-kursojn, kiuj okazis en la apuda hotelo Master. La kurson por komencantoj gvidis pakistatano loĝanta en Italio Mian Salam Shany kaj la progresantojn instruis Marc Giraud el Francio. Eblis ankaŭ lerni la italan lingvon kaj okazis ekzamenoj de IIE (Itala Instituto de Esperanto).



Kiel jam sciante, la italaj Esperanto-kongresoj estas renomaj pro altnivelaj plej variaj kaj interesaj programeroj. La temo de la ĉi-jara kongreso estis “Paco ne okazas hazarde: la aktiva rolo de ĝemel-urbaj rilatoj en la konstruo de eŭropa popolo”. Temis pri ĝemelaj urboj, pri kiuj dum la solena inaŭguro okazanta en la urba Aŭditorio San Barnaba, François Lo Jacomo emfazis la gravan kaj utilan rolon de ĝemeliĝo por interkompreno, en kiu ankaŭ Esperanto povas favore kontribui. Samtempe en la loko eblis aĉeti poŝtkartojn kun speciala stampo. Posttagmezo estis rezervita por gvidata promeno

tra la urbo por eksterlandanoj, dum italoj havis sian jar-sembleon.

La programo kontentigis ĉies postulojn. La matenojn plenigis seminarioj pri: “Nunaj konfliktoj en la Mediteraneo” fare de Javier Alcalde. Pri Sociaj retejoj: “Kiel starigi kaj prizorgi ilin?” AMO-seminario, zorgita de Debora Rossetti.

Dum la prelegoj ni povis ekscii pri “La historio de la okcitanaj lingvo kaj kulturo” de ties spertulo Jean-Marc Leclercq



(JoMo), pri “Hibridaj trajnoj por plibonigi la medion” donis informojn Vito Tornillo. Pri “Kultur-historio kaj pri ĝemelaj urboj” prelegis Detlef Haussner. Pri “30 oraj horoj kaj instruado en la lernejoj” informis Brunetto Casini. Pri “Ateistoj” parolis Anna Löwenstein. Pri “La biokemio de la enamiĝo” informis Luigi Fraccaroli. Pri “La itala lingvo en Svislando”

kompetente parolis Mireille Grosjean. Kunvenis ankaŭ itala sekcio de ILEI.

Ĉiutage okazis libro-prezentadoj. Ni ankaŭ spektis projekciadon de la filmo “Pino-hazarda vivo de anarkiisto”, dediĉita al la esperantisto Pinelli. Pri “Esperanto kaj Anarkiismo” parolis Javier Alcalde.

La organizantoj prezentis kaj donis informojn pri la venonta UK en Torino okazonta fine de julio kaj komence de aŭgusto 2023.

Pri nia aranĝo interesiĝis ankaŭ ĵurnalistoj. Venis televid-teamo, okazis intervjuoj kaj poste aperis artikoloj en loka ĵurnalo. En la publika dulingva debato “Kia rolo por la ĝemelaj urboj, pri la strebado al la paco en la Eŭropa kontinento”, partoprenis reprezentantoj de la urbo.



Riĉ-enhavaj estis ĉiuj vesperaj programeroj, kiujn ni ĝuis en subĉiela korto

de la palaco Broletto, kie okazis Festivalo de Esperantista Kulturo. Ili estis alireblaj al ĉiuj civitanoj, pri kio zorgis la urbaj instancoj. En busoj estis pendigitaj informoj pri la UK en Torino.

La vesperoj estis dediĉitaj al kulturaj programeroj. Plurlingvaj kantojn liveris kaj entuziasme kantis JoMo, koncertis Kim kaj Radio-mondo, Chiara Raggi kaj Mario Migliucci prezentis rakontokoncerton, Piero Nissim kaj Franco Meoli kantis “la

ĉiamverdaj kantoj” kaj ne mankis ital-lingva teatraĵo “Doktoro Esperanto”.

En la programo ne mankis pluraj tuttagaj kaj kelkaj duontagaj ekskursoj, kiujn bonege prizorgis Emanuele Regano. Tuttagaj ekskursoj direktiĝis al la urboj Milano, Bergamo kaj Verona. Naturon oni povis ĝui ĉe la lagoj de Garda kaj Isola kaj dum la duontaga ekskurso oni povis gustumi vinojn en Franciacorta, fama loko pro vin-produktado.

Post la resumo de la laboroj, polaj esperantistoj ĝoje kantis dankante al la organizantoj kaj poste la kongreso fermiĝis. Vespere ni povis denove kanti kun Debora Rossetti kaj Luigi Fraccaroli. La kongreso bone sukcesis malgraŭ la sufoka tropika vetero.



Venontjare la Itala Kongreso ne okazos pro la UK en Torino. Do, vi ĉiuj estas jam ekde nun invitataj partopreni la Universalan Kongreson en tiu impona urbo.

Liba Gabalda




## Neresheim estas urba komunumo en Germanujo

En la distrikto Ostalb kaj en la distriktaro Stutgarto de la federacia lando Baden-Virtembergo.  
Raportas Inge.

Neresheim situas 25 km for de Aalen, inter kamparo. Tre konata estas la abata kirko, konstruita laŭ la plano de la arkitekto „Balthasar Neumann“ ([https://eo.wikipedia.org/wiki/Johann\\_Balthasar\\_Neumann](https://eo.wikipedia.org/wiki/Johann_Balthasar_Neumann)), fino de la baroka epoko kaj pentraĵoj de la aŭstra freska pentristo „Martin Knoller“ ([https://de.wikipedia.org/wiki/Martin\\_Knoller](https://de.wikipedia.org/wiki/Martin_Knoller))



Interne



Ekstere

Kial oni trovas la nomon de Neresheim eĉ sur unu de la kolonoj de la “Triumf-arko” en Parizo, rilate al la bataloj de Neresheim?

### Batalo ĉe Neresheim

Je la 11-a de Aŭgusto 1796 komenĉiĝis tie la interbatalo de la aŭstra armeo (Erzherzog Karl) kaj la franca armeo (General Jean-Victor Moreau).

Sed neniu venkis (laŭ la germana historio sed ne laŭ la franca historio) Nuntempe dum batalo oni uzas “droneon” (flug-aparato kun kamerao) por scii, kie estas la malamiko, dum tiu batalo ĉe Neresheim oni uzis la unuan fojon flug-balonon (varmaera aerostato = dum tiu tempo nova franca invento) dum milito.

Por rememori la batalon en Neresheim oni hisas la francan flagon ja roko proksime de la Monaĥejo de Neresheim (popol-dire oni nomas ĝin “Napoleona roko” sed Napoleono neniam



estis en Neresheim, sed verŝajne Moreau parolis de tie al la soldatoj

**Mi estas ege feliĉa, vivi en tempo, kiam ne plu estas batalo inter Francujo kaj Germanujo.**

**Esperante, ke tio neniam ŝanĝiĝos kaj ni povas resti amikoj por ĉiam kaj ofte povi amikece renkontiĝi kaj babili en Esperanto**

Inge

## **"Gaja semajnfino"**

### **9a - 11a septembro 2022 Sonnenmatte, Erpzingen, Germanio**

*Esperanto-France-Est kaj Bavelo laŭvice organizas siajn printempajn kaj aŭtunajn semajnfinojn. Pro la pandemio jam dum du jaroj ili estis nuligitaj. Jen Bavelo sukcesis denove iniciati tiun aŭtunan semajnfinojn, nomata "Gaja semajnfino". Anstataŭ divers-gradaj kursoj estis proponita ĉefe turismado kaj loĝado en ferio-vilaĝo.*

La ferio-vilaĝo Sonnenmatte estas iom for de Francio, tamen el nia federacio venis 6 samideanoj. Ĝi troviĝis iom supre de monto-flanko. Ni loĝis en 4 apartaj domoj kun 3 aŭ 4 dormo-ĉambroj tipaj por familioj. Plej multaj komunaj manĝoj okazis en restoracioj.

Vendrede vespere, iuj kuraĝis promene atingi la restoracion, aliaj per aŭtoj. Inge deziris proponi nekutimajn maten-manĝojn. En tiu sabate ŝi proponis brecojn kaj blankajn kolbasojn. Tio donis al ŝi kaj al helpantoj multe da laboro. La maten-manĝo de dimanĉo kun vafloj estis eĉ pli laboriga. Ankaŭ por iuj germanoj ili estis iom fremdaj, ŝajne tio estis la celo.

Sabate matene ni vizitis la imponan kastelon Lichtenstein, tamen nur la eksteran parton, ĉar interpretado ne eblis interne.



#### **Kastelo Lichtenstein:**

Komence de la 19a jarcento la ŝvaba verkisto Wilhelm Hauff verkis romanon „Lichtenstein”, kiu vaste konatiĝis kaj famiĝis. Ĝia ĉefa scenejo estas ĝuste la kastelo. Sed tiu-tempe ĝi tute ne ekzistis. Troviĝis nur ruino de mezepoka sam-noma burgo. Ĉar la romano fariĝis granda sukceso, iu grafo decidis restarigi kastelon sur la tereno kaj en la jaro 1840 konstruigis la kastelon laŭ sia imago pri mezepokaj burgoj. Do, Lichtenstein fariĝis same "fabela" kiel tridek jarojn poste la pli granda kaj pli fama bavara Neuschwanstein.

#### **Ĉeval-bredejo Marbach**

Ĝi fondiĝis en 1491 kaj estas la plej malnova ankoraŭ ekzistanta ĉeval-bredejo de Germanio. Nuntempe ĝi estas unu el nur kvar en la tuta lando. Aparte grava tie estas la breda konservado de ĉevalaj rasoj, kiuj alie formortus, ekzemple la "malvarm-rasoj".

La sango-temperato de tiuj rasoj estas same alta kiel ĉe "varm-sangaj" rasoj, sed la malvarmuloj estas pli pezaj kaj fortaj, kaj havas pli trankvilan temperamenton, tial oni uzas ilin por pezaj laboroj en la agrikulturo, dum la varmuloj ĉefe servas por rajdado.)

**Fotoj kaj teksto: Andreo**



En la posttagmezo, ĉiuj veturis al ĉeval-bredejo de Marbach. Vasta tereno kun pluraj staloj. La ĉiĉerono ege pasie klarigis pri la bredado de ĉevaloj kaj ni ricevis multe da detalaj informoj. Plej ofte ĉevalinoj preskaŭ daŭre povas paŝtiĝi ektere, dum virĉevaloj restas plej ofte interne.



En la vespero estis proponita ŝvaba specialaĵo, nome ŝvabaj ravioloj kun viando kaj sen viando, surloke kiuritaj.

Vespere Jean-Luc prezentis la novajn librojn de nia Libroservo. Dume Serejo pretigis por ĉiuj, brazilan trinkaĵon, nomatan Cai Pirinha. En la glaso estis glacieroj, frukto-pecetoj kaj la sekreta alkoholaĵo. Ĉiuj volonte gustumis kaj ŝatis. La vespero finiĝis per anekdotoj kaj babilado.

Dimanĉe matene ni vizitis la urso-kavernon. Tie eblis admiri vastajn ejojn kun stalaktitoj kaj staligmitoj. Se ili daŭre kreskas ili ambaŭ povas kuniĝi kaj iĝi stalagnato.

Ni ĝuis agrablan semajnfinojn kaj lernis multon.

Multajn dankojn al la organizantoj kaj ĉefe al Inge, kiu vere multe laboris.



La tuta grupo ĉe la kastelo Lichtenstein:



Foto de Alfred

En Ŝvabujo furoras la ŝerc-bidoj de ĉevaleta kaj simieto.

Iam ili estis montritaj en televido SWR Stuttgart por allogi reklam-serion.

Pli poste ili estis uzataj kiel reklamiloj sur boteloj de minerala akvo.

Ŝajne la humuraĵoj estas pli trafaj en la ŝvaba dialekto.

Tamen jen du bildoj kun Esperanto-teksto.

Dum la vespero inge ja proponis plurajn tiajn humuraĵojn, iujn eĉ adaptitajn al la Gaja semajnfino.

Vespere ni sidu kune por babili Simieto:

*"Diru al mi, kiam ni ekscios, ke ni estas plenkreskuloj?"*

Ĉevaleta:



*"Kiam vi, en la vendejo kun via panjo, ne plu ricevos tranĉaĵon de kolbaso".*

Kuna sabata matenmanĝo

Ĉevaleta:

*"Aŭskultu, ĉu ni dividu la lastan pecon de ribokuko?"*

Simieto: *"Dankon, ne necesas. Mi sukcesos formanĝi la tuton sola".*



Jen recepto de pomaj vafloj laŭ klarigoj de Inge.

200 gramoj margarino

100 gramoj sukero

1 pakaĵetoj vanila sukero

4 ovoj

100 gramoj migdaloj aŭ aveloj muelitaj

iom da citrona suko

iom da Brando, Konjako aŭ Rumo,

125 ml lakto

250 g faruno

1 eta kulero bakpulvoro

Miksu ĉiujn ingrediencojn

En la jam miksitaj ingrediencoj enraspu la pomojn (sen la kernoj) kaj refoje miksu ĉion.

Baku en vaflobakilo. poste almetu (laŭ gusto) cinamon, raspitan sukeron,....



**Nia foto-paĝo**



**Someraj koloraj de naturo  
okaze de migradoj**




**Somero en Slovakio**



**Ĉamo en Ĵuraso**



**La rivero Doubs inter Francio  
kaj Svislando**



**Hombourg**

